# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 22/04/2021 Kvincentdudeksepa eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron


Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute 823,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo




Nun studas **290,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **238,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **215,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **80,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2021)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAÎOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).






N.ro 31 de "Por Komencantoj".

**GRAMATIKAJ KVIZETOJ:** Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Nur post kiuj verboj la infinitivo estas verbo?

2). Ĉar en aliaj pozicioj la infinitivo ne funkcias kiel verbo, kiel kiu vortspeco ĝi tiam funkcias?

3). La centro de ĉiu el la kvar frazpartoj havas specialan nomon. Kiu estas tiu nomo, kaj kiu vortspeco estas ĉiam la centro de la predikato?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 527 *Marcel Leereveld*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Intervjuo kun kvar ĉinaj kuracistoj ĉe la epicentro de la pandemio en Wuhan




Tre malĝoja historio pri la alveno de nekonita malsano en la malsanulejoj de Wuhan.

Legebla en 28 lingvoj laŭ via elekto, sed ne Esperanto *Roger Springer*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Dr.Daniel Kane forpasis je la 16a de Aprilo 2021





Estas kun granda malĝojo ke ni anoncas la forpason de nia amiko Dr.Daniel Kane kiu mortis hieraŭ en Melburno. Danny estis esperantisto ekde 1965 kiam li membriĝis al la Melburna klubo. Li estis tre bona amiko de Ivan Heldzingen kaj estis la honorinvitito ("*best man*") ĉe la geedziĝfesto de Ivan kaj Heather. Li havis imponan postenon kun la Diplomatia Servo kaj poste iĝis la Profesoro de la Ĉina lingvo je Macquarie Universitato. Li lasis du filojn kaj unu filinon. Li suferis pro Parkinsona Malsano dum la lastaj tri jaroj. Lia Esperanto estis je alta nivelo kaj li ofte instruis ĉe kongresoj. Li ĉiam estis bonkora, bonhumora, ege inteligenta kaj afabla. Ripozu en paco, Danny. *Heather Heldzingen* Ankaŭ vidu paĝon 4




**Betty kaj Henry Broadbent** Kun plezuro mi anoncas ke Betty kaj Henry Broadbent sufiĉe bone fartas. Ili translokiĝis al rezidejo por maljunuloj, *Goona Warra,* en *Sunbury* en novembro 2019. Antaŭ ol la viktorianoj devis resti endome pro la pandemio, la maljunuloj jam ne plu rajtis eliri aŭ ricevi vizitantojn. Mi iom prokrastis mian viziton ĉar mi esperis ricevi la vakcinon kiel ĉiuj homoj de la grupo 1B, sed vidante ke tio ne okazos antaŭ monato aŭ eble pli, mi decidis viziti ilin kune kun Bernie. Betty kaj Henry estis aktivaj membroj en Viktorio ĝis maljuneco malhelpis ilin daŭrigi siajn aktivecojn. Ni ĝoje babilis, interŝanĝis novaĵojn dum kelkaj horoj. Raportas *Franciska Toubale*





## _La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



http://esperantaretradio./pura-trinkakvo-helpe-de-sunradiado.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.


*Roger Springer*

## Humurbildojn




Multe da humurbildoj (kun komentoj) mi prenas el E-retpaĝoj! Mi nur por iuj BILDOJ (eble triono?) aldonas mian komenton (rimarkon, ŝercon)...Mi estas nur KUNaŭtoro de iuj bildoj! Sube estas ligilo al mia magazino de jam prezentitaj humurbildoj... Iru tien kaj prenu! https://tiny.pl/rn9gc







| | | |
|---|---|---|
| https://tiny.pl/rn9gc_ | Kun elkoraj salutoj | ***Marian** ZDANKOWSKI* |



## La Manlia Esperanto-Klubo




La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 17a de aprilo estis la tria sabato. Venis Roger, John, Chris kaj Ian.

Nuboj kovris la ĉielon, ondoj malaperis kaj Manlio ne plenplenis kun preterpasantoj kiel kutime.

Tamen ni daŭrigis nian legadon pri la Montreala Protokolo-- la detruado de la ozona gastavolo, CFC, lakŝprucaĵoj, fridujoj ktp. Subite ni konstatis ke ĉe Norda Narrabeen, alia plaĝo preskaŭ dek kilometrojn for, okazis grava konkurso pri surfado ( kun proksimume 500 spektantoj). Tie, oni ne priparolis lakŝprucaĵojn sed marŝprucaĵojn.! *Chris Holliss*


***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Daniel Kane 1948-2021



Kun grandega malĝojo mi eksciis pri la forpaso de Daniel Kane la 16an de aprilo. Li lernis Esperanton kiel junulo kaj fariĝis tre lerta Esperantisto. Li estis profesoro pri la ĉina lingvo en la Sidneja universitato: Macquarie University. Antaŭe li laboris dum iom da tempo en la aŭstralia ambasadejo en Pekino. Unufoje en 2006 li ankaŭ intruis altnivelan kurson en Esperanto pri Esperanto kadre de la sidneja universitato: University of New South Wales. Mi estis unu el liaj lernantoj. Daniel Kane ne nur estis tre sperta persono, sed ankaŭ ĉiam afabla, ĉiam bonkora. En 2014 mi intervjuis Daniel Kane kaj li interalie rakontas pri siaj spertoj pri tiu oficiala universitata altnivela Esperanto instruado kaj ke instrui tiun kurson ne estis ĉiam tute facila tasko por li. Spektu mian filmeton. La intervjuo kun Daniel komenciĝas 5 minutojn post la komenco kaj daŭras 6 minutojn.
https://www.youtube.com/watch?v=xJOYPC8mA6E Amike, *Nicole Else*

La detaloj de la funebra ceremonio estas: Funkcia Centro Wallumatta Tombejo kaj Kremaciejo Macquarie Park Lundon la 26an de aprilo 2021 2:00 pm - 3:30 pm La Macquarie-Parka Tombejo ankaŭ estas lia fina ripozejo, do vi havos la oportunon esprimi vian respekton al li kaj Xiaoqing ĉe ilia tombo je tiu tago *Chris Kane*




## PARTO KVAR


La Konfliktosistemo

En Risus, "konflikto" estas iu ajn konkurso en kiu kontraŭuloj luktas por pozicio, faras atakojn, konstruas memdefendojn, kaj malfortigas siajn kontraŭulojn por atingi venkon... Laŭlitere aŭ metafore. Ekzemploj de "konflikto" ampleksas:

Argumentoj: Kontraŭuloj svingas logikon, obstinecon kaj facilajn retorikajn trukojn por konvinki la kontraŭulon
Ĉeval-vetkuro: Homoj sur ĉevaloj kurantaj laŭ malpura kurejo, penantaj atingi nenien unue.
Dueloj en la aero: Aviadistoj en aviadiloj aŭ spacoŝipoj penas eksplodigi unu la alian el la ĉielo.
Spiritaj aŭ Psikaj Dueloj: Mistikuloj aŭ Psikistoj aspektantaj enuaj aŭ dormemaj, sed penantaj forŝiri la Egoon de la alia en la Fremdomondo.
Dueloj de Sorĉistoj: Sorĉistoj uzantaj strangajn magiaĵojn, penantaj superi unu la alian.
Duelantaj Banĝoj: Banĝo-ludantoj uzantaj strangajn melodiojn, penantaj superi unu la alian.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Delogadon: Unu rolulo (aŭ pli) penanta gajni poentojn kun unu alia rolulo (aŭ pli), kiu penas rezisti.



Juĝejaj Klaŭnaĵoj: Akuzisto kontraŭ Akuzito. La celo estas venko.
Justeco estas flanka.
Vera Regula Batalo: Homoj penantaj vundi aŭ mortigi unu la alian.
Dankon Ŝohano *(Shayne Power)*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)*



# Protekti la oceanojn.

## HELPU "VERDAN PACON"!

Tenadi la ekvilibron en la naturo de la oceanoj estas necesa por ne lasi formorti maranimalojn kaj marplantojn. La sciencistoj avertas nin, ke ĉar ni manĝas tro da grandaj fiŝoj, la nombro de malgrandaj fiŝoj proporcie pliiĝas tro multe, kaj ili kaŭzos ke iliaj manĝaĵoj de pli malgrandaj vivaĵoj en la oceanoj formortos, kaŭzante mankon de manĝaĵo por la balenoj. Se ni volas savi la balenojn, ni do ĉesu manĝi grandajn fiŝojn kaj manĝu nur malgrandajn.

Sed eĉ pli mortiga estas la sekreta fiŝado de jam formortantaj fiŝospecoj, kiujn oficiale la nacioj samopinias ne kapti. Ekzistas pluraj tiaj fiŝkompanioj, kaj estas malfacila kaj multekosta kontroli ilian agadon. Green Peace provas malkovri tiun kontraŭleĝan fiŝkaptadon, sed bezonas monon por povi fari tion. Ĝi faras tion ankaŭ por pruvi la neceson de pli strikta internacia traktato inter la nacioj. Jam plurajn jarojn oni penas krei tian traktaton, sed kelkaj nacioj bojkotas tion per troaj esceptoj. Jam oni samopinias ke oni ne fiŝu en pluraj lokoj de la oceanoj sed sen internacia kontrakto ne eblas polici tion. Green Peace helpas malkovri la danĝeran trofiŝadon de formortantaj fiŝospecoj, kaj mi esperas ke niaj legantoj helpos ĝin finance. *Marcel Leereveld.*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)* **SOLVO DE LA KVIZETO**



1). Nur post la modaj helpverboj (i.a. povi, voli, devi, rajti, kuraĝi).
2). Kiel substantivo.
3). La nomo de la centra vorto estas "kernvorto" kaj por la predikato ĝi estas ĉiam verbo.

*Marcel Leereveld.*

# 3ZZZ



En la elsendo de la 19a de aprilo Matt raportas pri plia murdo ate de policano en Usono: tiu de 13 jara knabo . Aŭdeblas alia parto de la intervjuo kun Duncan Charters pri ekzemplo de la graveco de la kulturokono en homaj rilatoj. Por distri vin Helen Palmer klarigas kiel pfajfi. *Franciska Toubale*

**La tialo pro kiu mankas informo pri via klubo estas ke via klubo ne sendis ĝin al AE**

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***